


# LA JUNA VIVO

DUSEMAJNA  
ORGANO



POR LA  
JUNULARO

Redakcio kaj Administrado:  
West-Graafthijk (N.H.)  
Nederlando.

Ĝironumero 209354 Nederlando.

Nederlando: jarabono f 0,75  
Unuobla ekz. f 0.03  
duobla ekz. f 0.06

Aliaj landoj: jarabono f 1.00.  
(15 Belg. fr. 10 Fr. fr.)

## IVAN KAJ MIŜHO.

En soleca loko en la Karpatoj, kien nur venis paŝtistoj kaj ĉasis-  
toj, loĝis granda, forta urso, Miŝho. Se oni vidus Miŝhon marŝi,  
oni tuj povus rimarki, ke ĝi lamas je la dekstra antaŭpiedo.

Pri la kaŭzo mi rakontos al vi.

Unu el la paŝtistoj, kies brutaroj paŝtiĝis supre en la Karpat-  
montaro, nomiĝis Ivan.

Kaj al tiu Ivan la urso jam ofte kaŭzis grandan domaĝon. Du  
bovojn kaj plurajn kaprinojn forrabis la urso de li. Ivan provis  
ĉiel sin liberigi de la malamiko, sed ĉio restis vana. La urso estis  
tiel ruza, ke Ivan ne sukcesis mortpafi aŭ veneni ĝin.

Sed nun li provos alian rimedon!

En la vilaĝo loĝis negocisto, Ŝlome, kaj al li Ivan mendis kap-  
tilon.

Fine de Oktobro la paŝtisto opiniis la ŝancon favora. Miŝho an-  
koraŭ ne estis en sia kaverno por la vintrodormo. Ankoraŭ estis  
abundo de nutraĵoj por ĝi. La sorparboj portis tiun ĉi jaron multajn  
fruktojn, kaj la ursoj ŝatas nenion tiel, kiel frostiĝintajn sorpojn.  
Krome kuŝis ankoraŭ bestkadavro en la arbaro, kiu garantiis al  
Miŝho dum longa tempo vivtenon. Ĝi estis kadavro de alko, kiun  
Ivan pafvundis, kaj kiu sukcesis rifuĝi kaj poste mizere mortis en  
la profundo de la arbaro. Do, pro tiuj ĉi motivoj Miŝho ankoraŭ  
ne pensis pri dormado kaj malsatado. Ĝi trairis la arbaron laŭ kurba  
kaj zigzaga vojo, reiris de temp' al tempo por kaŝi la postsignojn  
kaj fine ĝi saltis de sur arbo en sian provizoran kuŝejon. „Plomp!  
Nun vi serĉu min!”

Ivan serĉis pri Miŝho, sed ne trovis la urson. Li iĝis konfuza pro



la haoso de postsignoj kaj lia ŝanco tute perdiĝis, kiam la neĝo ĉiutage falis.

Tial li prenis pafilon kaj staradis embuske ĉe la alko-kadavro. Tamen li ne ekvidis sian malamikon: la susuro de falanta neĝo en la arbustoj estis ĉio, kion li rimarkis pri la urso.

„Bestaĉo!” grumblis la maljuna paŝtisto, „sed mi kaptos vin! Se mi nur havas la kaptilon!”

Post iom da tempo Ŝlome sendis la kaptilon kun ĉeno kaj ankro por fiksi ĝin al la tero.

Tuj Ivan eklaboris. Tiel ruze li lokigis la kaptilon, ke vere la postan tagon la urso estis kaptita je unu piedo. Sed pro tio ĝi tamen ne restis kaptita, ĉar Ivan ne ĝuste taksis la forton de la ega rabobesto.

Per forta ektiro la urso eligis la ankron el la tero kaj svingis la torturilon kun furioza blekado, ĝis fine ĝiaj fortoj estis elĉerpitaj pro doloro kaj laciĝo.

Kiam ĝi rehavis siajn fortojn, ĝi decidis denove iri al sia kaverno. La ĉeno estis ĉirkaŭ la antaŭpiedo, sed tio ne malhelpis ĝin laŭ la kutima maniero atingi la kuŝejon.

La maljuna paŝtisto vidis post kelka tempo, ke la urso malaperis kaj li eligis serion da insultnomoj adrese al Ŝlome, kiu sendis al li tro malfortikan kaptilon.

Tie kaj tie kelkaj sangogutoj el la piedo de Miŝho estis falintaj sur la teron, kaj kvankam malmultaj ili estis, tamen unu maljuna, forta montlupo kaj du iom malpli grandaj arbarlupoj pro tiuj gutejoj trovis la kuŝejon de la urso.

Tuj ili atakis la urson. Sed per siaj antaŭpiedoj Miŝho disdonis tiajn batojn, ke ĉiu el la atakantoj tuj povus morti pro ili, sed la lupoj estis tiel lertaj, ke ili sukcesis eviti la batojn. La tumulto allogis ankoraŭ du aliajn, kiuj atakis la urson dorsflanke.


Muĝante kaj spirblovante Miŝho ĉirkaŭbatis kiel furiozulo. Pats! Subite la ankro trafis la maljunan lupon al la kapo kaj fiksiĝis en ties kolo. La urso dolorblekis kaj tiel forte ektiris per la vundita piedo, ke la ankro derompiĝis kaj la lupo morta terenfalas.

Jen, bone! Per la malplena ĉeno Miŝho povis multe pli bone batali kaj baldaŭ la difektitaj malsatuloj komprenis, ke ili neniam povos venki la grandegan urson. Ili kvietigis sian malsaton per la kadavro de la maljuna lupo kaj ŝteliris for.

Sed ankaŭ Miŝho translokiĝis. Ĝi sentis sin ne plu sekura en tiu ĉi kaverno kaj elektis alian lokon. Foje en la dormo ĝi hazarde pre-



mis la risorton de la kaptilo. Tiu ĉi malfiksiĝis kaj Miŝho fortiris la vunditan piedon el ĝi. La vundon ĝi lekis ĉiutage, ĝis fine ĝi estis resaniĝinta. Sed kiom ege lamis la urso post tiu tempo! Ne, tiu piedo certe neniam reboniĝos!



Sed tion Miŝho malatentis. Malgraŭ tiu kriplaĵo ĝi restis teruro por la homoj.

Nelonge post ĉi tiu aventuro ĝi trovis en la ŝlimo de la riverbordo la bovinon de la pramisto. Verŝajne la lupoj pelis ŝin kaj tiel ŝi



engluigis. Kaj nun ŝi staris per la antaŭkruroj sur la bordo kaj plende muĝis pri helpo. Kiam la pramisto alvenis, ĉio estis silenta, sed la herbo estis plena de sango kaj ŝlimo.

Miŝho jam kaptis kaj fortrenis la ankoraŭ vivantan beston. Duonan verston pli malproksime la pramisto trovis sub ŝtonoj kaj musko la kadavron de la kompatinda besto.

Pro tio la urso suferos! Pro la rabo de tiu ĉi belega laktobovino ĝi ricevos grandan punon!

Ivan kaj la pramisto tuj komencis kovri la restaĵojn de la bovino per pezaj granitŝtonoj, por ke la lupoj ne povu fortreni ilin. Poste ili fosis du kavojn, tiel ke formiĝis kanaletoj, kiun la urso ne povos transiri. Kaj post tio ambaŭ viroj embuske stariĝis, ĉiu kun malmoderna pafilo en la manoj.

La vespero venis kun malvarmo kaj nebulo, kun la blekado de la strigoj, la ululado de la lupoj, kaj pli da tremigaj noktosonoj. Al la pramisto la angorŝvito staris sur la frunto kaj li deziris ne esti komencinta la tutan aventuron.

Kiam la luno malaperis post la rapidaj nuboj, venis ŝtelire mal-lumaj figuroj, kiuj ektiris la karnaĵon, ekrodis la ostojn, kaj vane penis forigi la ŝtonojn.

Subite unu el ili streĉis la orelojn, traboris la mallumon per flamaj okuloj kaj forsaltis, dum la aliaj ĝin sekvis. Sammomente la terura urso staris sur la bovinkadavro. Kolere grumblante ĝi forĵetis la ŝtonojn, kiujn la lupoj kune ne povis forigi. Tiam ĝi grincis kaj ŝmacis! La pramisto tremegis. Al Ivan la sango batis en la tempioj!

Jen li ekpafis. Forte la pafo sonis tra la arbaro. Teruriga blekado kaj furioza batado per la antaŭpiedoj estis la respondo de Miŝho. Plena de angoro la pramisto forkuregis. Li vidis ankoraŭ, ke la urso staras sur Ivan kaj volas dispremi lin per siaj kolosaj piedoj.

La postan matenon oni hejmenveturigis Ivan per sledo kun pajlo. Feliĉe li ne estis senviva, kvankam tre vundita. Li sufiĉe rapide resaniĝis, sed lia dekstra kruro estis tiel dispremita de Miŝho, ke li iris lame dum sia tuta posta vivo. Ankoraŭ ili vivas: Miŝho kaj Ivan, kaj ankoraŭ ĉiam ili minacas unu la alian. Unu trovas la alian la plej grandan friponon, kiu vivas surtere, kaj laŭ sia vidpunkto ili ambaŭ pravas.

El la holanda: VANE.



## DANĜERA LUDILO.

Antaŭ 15 jaroj mi loĝis kun miaj gepatroj kaj frato en la vilaĝo Björnebo en Norvegio. Tiu vilaĝo kuŝas en min-distrikto, kie estas multaj minejoj, el kiuj oni fosas fer-ercon kaj aliajn mineralojn.

Iun tagon mi promenis kun miaj frato kaj norvega amiko sur la relvojo, kiu iras de unu minejo al alia. Ni intencis viziti minejon por rigardi la laboron tie. Mia frato kuris iom antaŭ ni kaj subite li ekkriis: „Jen, kion mi trovis!” Ni tuj rapidis al li.

En sia mano li tenis dinamitpecon. Dinamito tie ĉi, sur la relvojo! Verŝajne ĝi defalis de vagonaro, kiu transportis dinamiton al la minejoj. Aŭ iu ministro kunprenis ĝin el minejo por privata uzado kaj dumvoje hejmen perdis ĝin. Kion ni faru kun ĝi?

Ni tre singarde esploris la trovaĵon, ĉar dinamiton oni devas trakti per delikataj manoj. Post kelka tempo mia amiko diris, ke li hejme havas eksplodigilon, kaj li proponis, ke ni iru al lia hejmo por alporti ĝin. Li diris entuziasme: „Ni eksplodigu la dinamiton! Tio estos interesa kaj amuza, ĉu ne?”

„Eksplodigu la dinamiton?” Mi ne tuj respondis, sed pripensis lian proponon. Subite mi ekmemoris aferon, kiu okazis antaŭ nia alveno en Björnebo: amikoj rakontis ĝin al mi:

„Kelkaj buboj 13-jaraj sukcesis ŝteli dinamitpecon ĉe minejo kaj ili volis ludi per ĝi. Ili ankaŭ havigis al si eksplodigilon kaj ĝin ili enmetis en la dinamiton. Sed nun estiĝis la demando: „Kiel eksplodigi la dinamiton?” Post mallonga diskuto ili decidis, ke la plej juna el ili, la 8-jara Age, tenu la danĝeran eksplodaĵon.

„Tute ne estos danĝera,” ili asertis al la tima knabeto. „Vi nur tenu ĝin ĝis la flamo de la eksplodigilo estos proksime al la dinamito, tiam vi forĵetu ĝin, por ke la bombo eksplodu en la aero,” ili diris.

Iu pli aĝa knabo ekbruligis la eksplodigilon, poste li kun la aliaj knaboj forkuris ĝis sekura distanco. La okjarulo atente kaj time rigardis la brulantan aĵon, kiu kraketis kaj elsputis fajrerojn.

Kiam la flamo estis tre proksime al la dinamito, li volis forĵeti ĝin; li levis la manon por forta ĵeto, sed: Pang!! ..... la dinamito eksplodis en lia mano, kaj ŝiris ĝin en pecojn. La kompatinda knabeto svenis kaj liaj kamaradoj devis porti lin al la kuracisto.

Tiu sukcesis iomete ripari la ege vunditan manon, sed tamen li devis amputi kelkajn fingrojn, ĉar nur la dikfingro restis senvunda.

Neniam mi forgesos, kiam mi la unuan fojon renkontis tiun kna-



beton. Antaŭe mi ne sciis la historion, kaj kiam li etendis sian manon al mi por manpremo, kaj mi ekkaptis la restaĵon de tio, kio iam estis fortika, belforma knabmano, la ploro venis en mian gorĝon. Kompatinda, tre kompatinda knabo, kiu dum sia tuta vivo devos esti invalido pro la stulteco kaj malkuraĝeco de siaj amikoj. Tiujn bubaĉojn oni poste tre severe punis.”

Tiun ĉi okazaĵon mi rakontis al miaj frato kaj amiko, kiam ni daŭrigis nian iron. Dum nia interparolo ni venis al loko, kie la relvojo iris laŭ malgranda lago, kaj tie mi prenis la danĝeran ludilon de mia frato kaj ĵetis ĝin en la akvon malproksime de la bordo. Eble mi per tio savis miajn fingrojn; eble eĉ la vivon.

Originale verkis B. K.

Āmål, Svedlando.

## MALGRANDA VIRO IRIS



Malgranda viro iris  
De land' ĝis land' per ekstra trajn';  
Plej grandan viron volis  
Li trovi ie ajn.

Li vidis multajn landojn	Rigardis li la maron
Kaj estis ĉe la grandmogul';	Brilantan en la klara sun'
Neniu viro ŝajnis	Kaj ridis, ĉar li vidis
Al li la grandegul'.	Plej grandan viron nun.

(Grandmogulo = potenco, azia reganto.)

Odense, Danujo.

Trad. H. P. NIELSEN.

**Se eksterlandanoj grupe abonas la gazeton, ili pagas nur la nederlandan abonprezon.**



## KION VI DIRAS PRI MIA AMIKO?

(Societa ludo).

Ses infanoj sidas en ĉambro kaj laŭte interbabilas.

Luisse: „Nun silentu. Fric iĝas malpacienca kaj ne pli longe volas atendi. Estas malvarme en la koridoro. Atentu bone, por ke vi ne erare parolu. Alie li tuj divenos. Li devas kredi, ke ni parolas pri vera homo kaj ne nur pri poŝhorloĝo.”

Fric (ekstere) „Ĉu mi povas eniri? Mi preskaŭ frostiĝas.”

Ĉiuj: „Jes, jes, eniru nun, ni estas pretaj.”

Fric: „Nu Minjo, kion vi diras pri mia amiko?”

Minjo: „Mi ŝatas lin; li estas simpla, ronda viro.”

Fric: „Kaj vi, Henriko?”

Henriko: „Mi opinias lin stulta; mi kredas certe, ke li lasas sin eksciti de ĉiu.”

Fric: „Kaj kion vi pensas pri li, Luise?”

Luisse: „Li kuŝas tutproksime al via koro.”

Fric: „Kaj vi, Hermino, kion vi opinias?”

Hermino: „Tiel ege stulta li tamen ne estas. Li precize scias pri sia tempo. Kaj ĉiam scias, kioma horo estas.”

Fric: „Ĉu vi scias bonon aŭ malbonon de li, Johano?”

Johano: „Li havas multajn eminentajn parencojn, al kiuj centmiloj demande rigardas!”

Fric: „Anjo, kio estas via opinio?”

Anjo: „Li naskiĝis en Svisujo, se mi ne eraras.”

Fric: „La kukolo komprenu tion. Mi ne divenas, mi ne divenas. Eminentaj parencoj, stulta, ne stulta, ronda kaj simpla, naskiĝis en Svisujo ..... Vi Manjo, diru ankoraŭ ion.”

Manjo: „Fakte, via amiko estas amikino.”

Fric: „Kaj kuŝas tutproksime al mia koro? Strange.”

Henriko: „Jes, tiel estas. Kaj ŝi sufiĉe bele aspektas, sed, domaĝe, ŝiaj kruroj havas malegalan longon. Ŝi tamen bone iras, tion mi devas konfesi.”

Fric: „Mi kredas, ke mi nun sentas la postsignon. Parolu vi ankoraŭ unufojon, Manjo.”

Manjo: „Ŝajnas, ke vi ne estas tutcerta pri ŝia fideleco, alie vi ne daŭre tenus ŝin per ĉeno: fil!”

Fric: „Nun mi komprenas. Estas mia poŝhorloĝo.”

Harlemo Nederlando

PIKILO.

(Ekzercu per multaj aliaj objektoj)



**LUDO.**

La ludantoj sidas ĉirkaŭ la tablo. Unu el ili diras: „Mi estis en granda butikoj kaj aĉetis ĉapelon.” La persono, kiu sidas apud la parolinto, nun ripetas la frazon kaj aldonas la nomon de nova objekto. Tiel oni daŭrigas.

Ekzemple: La unua diras: „Mi estis en granda butikoj kaj aĉetis ĉapelon.” La dua: „Mi estis en granda butikoj kaj aĉetis ĉapelon kaj libron.” La tria: „Mi estis en granda butikoj kaj aĉetis ĉapelon, libron kaj kraĵonon.” k.t.p.

Se iu eraras aŭ forgesas ripeti vorton, li ne plu povas kunludi. Estas plej bone, ke unu el la ludantoj notas ĉiujn vortojn por povi kontroli, ĉu iu eraras.

La ludo estas tre amuza, kiam partoprenas multaj personoj.

Ekzercu ankaŭ per alia temo. Ekzemple: Petro iris al tendaro kaj kunprenis: dorsosakon, k.t.p. Mi estas farmisto kaj posedas tri ĉevalojn, k.t.p. Mi vizitis la urbon kaj vidis la urbdomon k.t.p.

West-Grafftdijk.

N. K.

**BELO.**

Malriĉaj geedzoj havis nur ankoraŭ hundon, nomita „Belo.” Belo ne estis bela sed fidela. Ofte la edzo volis mortigi la beston por havi nutraĵon. La bonanima patrino kontraŭdiris ĉiam kompateme: „Lasu la karan Belon vivi.” Sed la malsato kreskis de tago al tago kaj fine Belo devis fordoni sian hundan vivon. Plorante la edzino preparis bonan tagmanĝon, sed kiam bonodoro sin ŝtelis en la nazon de la kuiristino, ŝi ekprenis novan kuraĝon kaj alvokis la edzon, kiu malsata laboris en la korto. Hundviando, terpomoj kaj salato envitis la geedzojn je bona manĝado. Beninte Dion pro la bona nutraĵo la du maljunaj satigis sin plenplene. Kiam fine la edzino forprenis la manĝilaron kaj la ostojn, ŝi diris plengeje sed sen priprenso: „Ho, kia feliĉo, hodiaŭ ni havas almenaŭ bonajn ostojn por doni al nia Belo.”

E. H.

Bueron. Svisujo.

**Vendu „La Juna Vivo” ponumere, por ke ĉiu povu legi ĝin.**



## Solve el No. 12-13.

t		k	u	k	o	l	o
e	t				v		
r	e		d	u	o	p	e
	n			z		i	
i	t		m	o	r	o	j
n	i				e		e
o		p	e	r	e	a	s


## Solvej el No. 14-15:

damo, famo, gamo, amo.  
ro, ero, tero, etero, letero.

R.

Belgujo.

## I. Novaj Enigmoj.



i, i, i, i, i, l, l, m, m, o,  
o, o, o, s, s, t, t. La vortoj  
signifas horizontale kaj  
vertikale:

1. Beston.
2. Numeralon.
3. Arbon.

Riga. Latvujo, B. REICHBERG.

II. Serĉu kvarliteran vorton, kiu signifas petolan knabeton.

Ŝanĝu la unuan literon, kaj laŭvice vi havos: Ludilon, akvova-  
poron, rompitaĵon, cilindroforman, objekton.

III. Serĉu ses vortojn, kvin literajn, kaj skribu regule unu sub alia

- |  |   |
|--|---|
| 1a krii  | 4a donaci (nuna tempo).                         |
| 2a montri per signo sian res-<br>pekton (rad.) | 5a petante favoron.                             |
| 3a substanco el elefanto.                      | 6a ilo por verŝi fluidaĵon en<br>barelon (rad.) |

Legu vertikale la duajn kaj kvarajn literojn por havi taŭgan kon-  
silon.

Soissons, Francujo.

J. BOURNICHE.

**Inter la ensendintoj de la ĝustaj solvej ni disdonos 4 premiojn.  
Ni akceptas solvejojn ĝis la 15-a de Aprilo.**

Ni ricevis abonmonon el Valencio de Palanones sed la sendinto  
forĝesis mencii sian ĝustan adreson. Ankaŭ Osuto Jamis el Buda-  
pest petis informon pri mosenkado sen ke li skribis sian adreson.  
Ni esperas baldaŭ ricevi ilin.



## POR KOMENCANTOJ.

### LA AZENO.

Oni ŝarĝis azenon per salo. Ĝi venis al rivereto, faletis kaj falis en la akvon. Kiam ĝi ekstaris, ĝi rimarkis, ke ĝia ŝarĝo fariĝis multe pli malpeza. Kun ĝojo ĝi notis tion en sian memoron.

Foje la azeno ree venis al la rivereto, sed nun oni ŝarĝis ĝin per spongoj. Propravole ĝi kuŝiĝis en la akvon, sed ... ho ve, la spongoj per la akvo tre peziĝis kaj la azeno ne plu povis ekstari kaj dronis senhelpe.

### LA STRANGA RECEPTO.

Antaŭ multaj jaroj okazis tre amuza afero en malgranda urbo. Ĉe apoteko haltis veturilo. La viro, kiu kondukis ĝin, forprenis grandan ĉambropordon de la ĉaro, kaj portis tiun en la butikon.

La apotekisto tre miris pri tio kaj diris: „Kara viro, kion vi deziras fari ĉi tie? La ĉarpentisto loĝas apud mi.”

Sed la strangulo respondis: „La kuracisto ordonis medikamenton por mia malsana edzino. Ĉar mi ne havis paperon, nek inkon, nek plumon, la doktoro skribis la recepton per kreto sur la pordon. Kaj nun bonvolu kuiri la trinkaĵon.”

La apotekisto ridegis, sed fine li tamen povis pretigi la kuracilon.

### KATO KAJ PASERO.

Pasero matene sidis sur sterkejo de bienkorto. Kato kaptis la birdon kaj intencis ĝin formanĝi. La pasero diris: „Vere granda sinjoro ne manĝas antaŭ ol li lavis sian buŝon.”

„Snur”, diris la kato. Kaj ĝi intencis montri, ke ankaŭ ĝi estas .... vere granda sinjoro. Ĝi metis la paseron sur ŝtonon kaj komencis purigi la buŝon per sia piedeto.

„Huŝ” — la pasero estis for.

Pri tio la kato tre koleris kaj ĝi diris: „Dum mia tuta vivo mi ĉiam volas antaŭe matenmanĝi kaj nur poste purigi mian buŝon!”

Tiel agas la kato ĝis hodiaŭ.

Aŭstrio.

J. WIESBÖCK.



## KIEL PASEROJ SAVIS LA VIVON DE BRAVA JUNULO.

En Vieno vivis bona junulo. Li loĝis en malgranda ĉambreto, tra kies fenestroj li povis vidi nur la kvar murojn de malluma, malbela korto. La junulo neniam vidis homojn, kiam li frumatene malfermis la fenestron, sed ĉiumatene li profunde amuzis sin pri aro da pase-roj, kiu ĉiutage venis al lia fenestro.

La junulo estis bonkora homo kaj kompatis la birdetojn dum la frosta vintro-tempo. Li donis al la malsataj bestoj la restaĵojn de la matenmanĝo. La inteligentaj paseroj ĉiam venis precize je la sepa, por ricevi la donacon.

Iam okazis, ke jam forpasis la sepa horo, kaj la fenestro restis ankoraŭ fermita. La paseroj fariĝis senpaciencaj kaj postulis sian matenmanĝon pli kaj pli laŭte. Sed okazis nenio .....

Ĉar la bruo fariĝis ĉiam pli laŭta, la najbaroj rimarkis ĝin, kaj kiam ili vidis, ke la fenestro de la junulo restas fermita, ili iris al la pordo por veki la dormanton. Sed li ne vekigis. Jen ili perforte malfermis la pordon kaj trovis la junulon senkonscia en la lito. La ĉambro estis plena de lungaso. La homoj forportis la junan homon kaj lia vivo povis esti savata. La junulo do dankŝuldis sian vivon al la ..... paseroj .

Aŭstrio

J. WIESBÖCK.

---

## LA LARMKRUCETO.

La infaneto estis mortinta. Ĝia patrino ĉiam ploris kaj ploris. Ĉiunokte ŝi iris al la tombo kaj plendis tiom, ke eĉ ŝtonoj devus senti kompaton.

Iam en sonĝo la bedaŭrinda patrino vidis aron da infanoj. Tutlaste iris malgranda infaneto, kiu tenis en la mano pezan kruĉon. Ĝia ĉemizeto estis malseka kaj la infaneto ne povis sekvi la aliajn. Kun granda miro la patrino vidis, ke tiu infano estas ŝia propra knabino. Kaj la infano diris al la patrino: „Vidu, mia ĉemizeto estas malseka. Mia kroĉo pleniĝis de viaj larmoj. Ne plu ploru pro mi, mi ne plu povas porti la kroĉon!”

Poste foriris la infano. La patrino vekigis. Unufoje ŝi ankoraŭ ploris kaj poste neniam plu.

Schattendorf, Aŭstrio.

Laŭ Grimm trad. J. Wiesböck.

---

KORESPOND-ADRESO: ĈIU VORTO: 0.03 GLD.



## LA DEKKVARA LECIONO.

- A. Mi lud-**is**. **Hieraŭ** mi estis malbona knabo.  
 Li lud-**as**. Hodiaŭ mi estas malbona knabo  
 Ŝi lud-**os**. **Morgaŭ** mi estos bona knabo.

Morgaŭ mi venos. Ni manĝos morgaŭ supon. Ni trinkos kafon. Ili vekos nin.

B. Malriĉa viro ricevis poton da **mielo**. Li tre ĝojis, ĉar li **pensis**: „Tiun mielon mi **vendos**. Por la mono mi aĉetos kokinojn. Ili donos **ovojn**. Tiujn ovoj mi vendos. Mi ricevos multe da mono. Tiam mi aĉetos ŝafidojn. Ili kreskos kaj **donos** lanon. La monon mi **ŝparos**, ĝis mi havos **sufiĉe** por aĉeti unu bovinon. Tiu bovino donos **profiton** kaj baldaŭ mi havos tri, kvar, kvin. Mi estos tiam **bonstata farmisto**.” Pro ĝojo li komencis **danci**. Sed, ho ve! Li **tuŝis** la poton. La mielo **fluis** sur la planko. For estis la bela **estonto!**

C. riĉa — riĉ-ulo; timi — tim-ulo; kun — kun-ulo; kontraŭ — kontraŭ-ulo; bruna — brun-ulo.

**blindulo**, bonulino, dikulo, feliĉulo, fremdulo, fortulo, grandegulo, komikulo, kontentulo, malliberulo, **senlaborulo**, malriĉulo, grizulo, **avarulo**, **surdulo**, **mutulo**, sanulo, malsanulo, **karulino**, **junulo**, gejunuloj.

D. **fero** — fer-aĵo; legi — leg-aĵo; **paki** — pak-aĵo, porko — pork-aĵo; bovo — bov-aĵo; **glacio** — glaci-aĵo; belaĵo, kreskaĵo, pentraĵo, dolcaĵo, posedaĵo, amikaĵo, bonaĵo, bakaĵo, eksteraĵo, fabrikaĵo, fruktaĵo, laboraĵo, ovaĵo, pomaĵo, publikaĵo, restaĵo, skribaĵo, sukeraĵo, supraĵo, teraĵoj, trinkaĵo, manĝaĵo.

## MIA PATRINO.

E. Si **neniam** promenas kun ni, ŝi ankaŭ ne faras **ekskursojn** kun ni. Kial ne? Ĉar mia patro jam **depost** du jaroj estas **senlabora**. Ni ne havas monon. **Panjo** ne scias, kiel aĉeti manĝaĵojn. Ŝi ĉiam flikas, ĉar ŝi ne povas aĉeti novaĵn vestojn. Mia patrino ofte **koleras**, kiam ŝi vidas **truojn** en la ŝtrumpoj aŭ pantalonoj. Tiam ŝi estas malbonhumora kaj ni **rajtas nek** kanti nek fajfi. Tiam mi scias, ke la mono forestas. Panjo ofte diras: „Fari bonan tagmanĝon, **se oni** havas monon, ne estas **arto**. Sed kuiri bongustan manĝon sen mono, tio estas arto.” Mi ĝojas, kiam la patro ricevas la **subtenon** por la **senlaboruloj**. Ĝi estas la **sola** gaja tago en la tuta **semajno**.

Günter, 10-jara. Berlino.



- I. Lernu parkere la novajn vortojn en A, B, C, D, E.
- II. Traduku A, B, C, D, E, en vian gepatran lingvon.
- III. Post kelkaj tagoj traduku A, B, C, D, E el via gepatra lingvo en Esperanton.
- IV. Lernu parkere la rakonton pri poto da mielo.
- V. Respondu al la demandoj:



Ĉu mia patrino ofte promenas kun ni? Kial ne? Kion ni malhavas? Kial ŝi ĉiam flikas? Kiam la patrino koleras? Ĉu ŝi tiam estas malbonhumora? Kion panjo ofte diras? Kio estas arto? Kiam mi ĝojas? Ĉu mi ofte estas gaja?

El: „Lighthart en Scheepstra, Dicht bij Huis”, J. B. Wolters, Groningen—Den Haag—Batavia.



## LA DEKKVINA LECIONO.

## Per Trajno.

La patro kaj infanoj iras per trajno al la urbo por **gast-loĝi** ĉe la geonkloj.

La vojaĝo jam estas plezura.

Komence la patro aĉetas **biletojn**. Poste ili paŝas al la perono.

Kiom da bruoj! Homoj kun vojaĝo-**kofroj**, **servistoj** kun ĉaroj plenaj de **pakaĵoj**, sinjorinoj kaj sinjoroj. La maŝino ĉiufoje elpuŝas profundan ĝemon, **kvazaŭ** ĝi **timetas** novan veturon.

„Ĉu tiun vagonon, patro?” demandas Manjo.

„Tio estas ŝarg-vagono!”

„Do ĉi tiun!”

„Ankaŭ ne, ĝi estas **poŝt-vagono**. Vidu, tie vi legas: Leteroj.”

Fine ili sidas. Nun la trajno forveturas, **iom post iom** ĝi iras pli rapide. Ho, granda **diferenco kompare** kun la boato, pensas Heĉjo.

La lokomotivo fajfas. La trajno nun iras **pli kaj pli** malrapide.

Kun **skueto** ĝi fine haltas.

„Ĉu elpaŝi?” demandas Manjo.

„Ankoraŭ ne,” diras la patro. „Ankoraŭ unu **stacio**.”

La trajno ree rapidas **plue**. La telegraf-fostoj preter-flugas!

Heĉjo kaj Manjo nombras: unu, du, tri, kvar. Jen ree unu fosto. Kaj **fiam** ili denove nombras.

Fine la trajno haltas. Nun ili estas en la urbo.

- a. Lernu bone la novajn vortojn.
- b. Traduku la rakonton en vian gepatran lingvon.
- c. Legu kelkfoje la lecionon kaj respondu al jenaj demandoj:

Per kio vojaĝas la patro kaj la infanoj? Kia estas la vojaĝo? Kion faras la patro? Kien ili poste iras? Kion ili vidas sur la perono? Kion elpuŝas la maŝino? Ĉu la trajno rapide veturas? Kial la lokomotivo fajfas? Kiel nun iras la trajno? Kial haltas la trajno? Ĉu ili jam estas en la urbo? Kio preterflugas? Kiuj nombras?

Uzu la jenajn vortojn en esperantaj frazoj:

agrabla, alta, amuza, amika, apuda, arta, avara, malavara, bela, malbela, besta, blanka, blindata, blua, bona, malbona, brila, brua, bruna, danĝera, dekstra, maldekstra, difekta, ekstera, eleganta, maleleganta, familia, feliĉa, fera, fiera, flava, forta, frata, fremda, freŝa, frua, gaja, granda, griza, ĝoja, homa, internacia, jena, jesa, nea, kamarada, komika.



## LA LASTA PETO.

„Joĉjo, bonvolu alporti glason da akvo?” petis Manjo, kiu kuŝis malsana sur la divano. Ŝi havis fortan febron kaj sopiris al gluto da freŝa akvo. Sed Johano profundiĝis en sia ludo kaj ne aŭdis la mallaŭtan voĉon de sia fratineto. Iom poste Manjo ree petegis glason da malvarma, tre malvarma akvo, ĉar ŝia buŝeto brulas. Tiam Johano plenigis glason el karafo, kiu jam la tutan tagon staris en la varma ĉambro.

Manjo portis la akvon al siaj sekaj lipoj, sed sentante, kiel varmeta ĝi estas, ŝi diris: „Joĉjo, forĵetu ĝin, kaj donu freŝan akvon, el la pumpilo, mi petas!”

„Kial,” Johano diris kolere, „Ĉu la akvo ne sufiĉe taŭgas? Mi ne deziras iri al la pumpilo por unu glaso da akvo!” .....

Kaj Manjo trinkis pacience la sengustan akvon.

Post tiu tago ŝi neniam plu petis ion al Johano, ĉar la sanstato de Manjo subite malboniĝis kaj tiun saman vesperon ŝi mortis.

Kaj, kiam ĉiuj staris ĉirkaŭ la malgranda ĉerko kaj ploris amare, neniuj estis tiom malĝoja, kiom Joĉjo. Ĉar kun akra pento li pensis pri la lasta servo — gluto da freŝa akvo — kiun li rifuzis al sia fratineto.

Amsterdamo, Nederlando.

C. v. T.

---

## KOMUNIKOJ PRI LA GAZETO.

La esperantistaj grupoj en jenaj lokoj abonis „La Juna Vivo”.

Jugoslavio: Split.

Danujo: Köge.

Nederlando: Heerenveen, Uitgeest, Kwadijk, Volendam, Heilo, Middellie, Koedijk, Stompetoren, Beets, Andijk, Oosthuizen.

La jenaj infangrupoj abonis la gazeton: Odense (Danujo), Middellie (Ned.)

---

## KORESPONDADO.

M. Stompetoren; Nederlando: Lingvo kaj stilo estas bonaj. La enhavo tamen estas tro komplika.

K. Utrecht, Nederlando: Jam aperis en „La Progresanto”.

Z. Arolskoje, Sovetio: La priskribo ne sufiĉas.

B. B. d'Aillac, Francujo: Unu el viaj rakontoj ni enmetos.

B. Lyon, Francujo, F. Parizo, Francujo; M. Koblenz, Germanujo: Viaj verkaĵoj ne sufiĉas.

Pro spacomanko multe da kopio ni ne povas enmeti.



**MALALTIGO DE LA REKLAMTARIFO:**

**I paĝo: 15 gld.; ½ paĝo: 8 gld.; ¼ paĝo: 4,5 gld.; ⅛ paĝo: 2,5 gld.;**

**Kalendaro poŝtkarto por 1935**

Kunportu ĝin en poŝpaperujo aŭ notlibro; uzu ĝin ĉiutage, montru al neesperantistoj kaj sendu ĝin al viaj gekorespondantoj.

Du modeloj: laŭlonge kaj laŭlarĝe presitaj. Prezo aŭfrankite 20 ekz.: hgld 0.55; specimene 4 ekz. por unu respondkuponon aŭ hgld 0.12½. Eldonejo H-E-O- Soesterberg, Holando Poŝtkonto 88015.

**Jarkotizo**

Aŭstrujo .....	3.20 ŝil.
Britujo .....	3 ŝil.
Danujo .....	3 kr.
Ĉeĥoslovakujo .....	16½ Ĉ. kr.
Svislando .....	2. 10 fr.
U.S.A. ....	0.70 dol.
Germanujo .....	1.75 M.
Hispanujo .....	5 pes.
Norvegujo .....	2.7 kr.
Polujo .....	3.6 zl.
Svedujo .....	2.70 kr.



**„FLORETOJ”**  
**Porinfanaj Rakontoj**  
**tradukitaj de la**  
**„VENDREDA KLUBO”**  
**en Winschoten**  
**(Nederlando)**

Kun multaj koloraj kaj nigraj  
 bildoj  
 de C. Jetses  
 prezo ..... 0.70 ned. guld.

**Aĉetebla en ĉiu librejo kaj ĉe la  
 eldonisto:**

**J. B. WOLTERS**

**Groningen — Den Haag  
 Batavia.**

**Bonvolu sendi la monon por „La Juna Vivo”:**

*Ameriko:* Amerika Esperanto-Instituto, Madison. Wis., Usono.

*Anglujo:* The British Esp. Association, Inc. 142 High Holborn, London, W.C.I.

*Belgujo:* Hendrik Rainson, Mechelen, Belga ĝironumero 335183.

*Ĉeĥoslovakujo:* L. J. Svoboda, Plzen, Květinárstvi „U Zvonu” ĝironumero 14171 Praha.

*Danujo:* S.rino M. Jensen, Galtrup. Erslev. ĝironumero 44593.

*Franclujo:* S.ro Matthieu, Dijon, 27 Place de la République, Côte d'Or.  
 ĝironomero: Cheque postal No. 12025. Dijon. (Côte d'Or).

*Germanujo:* Ewald Killmer, Schwabenweg 14, Wuppertal-Elberfeld. Germana  
 ĝironumero: „Köln 104097”.

*Hispanujo:* S.ro Montserrat, str. Provenza, 75, 2°, 3°, Barcelona.

*Svedujo:* John Karlsson, Hylinge Norrköping. Sveda ĝironumero: 72295.

*Japanujo:* Ishiguro, Daita 1—784, Setagaya, Tokio.

*Ĉinujo:* S-ro Ĉan, 15 Shang Sieh Chia, Peiping.

Oni povas pagi per eksterlanda poŝtmandato, **7 poŝtrespondkuponoj**, \*) ĝirokonto, aŭ papermono en letero. Informiĝu en la poŝtoŭficejo, kio estas la plej malkara.

\*) Abonantoj, kiuj ne rajtas sendi monon eksterlanden, povas pagi per 7 respondkuponoj.